

# Flandra ESPERANTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks  
Zeventiende jaargang  
Nummer 12 (198)  
DECEMBER 1950

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P.M. Mabesoone  
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 75 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 60 fr.  
Ceteraj landoj: 75 fr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## FORIGU LA VENENON!

Por esti gvidata, organizaĵo bezonas aparaton. La taskoj plenumendaj estas diversaj; ili ampleksas la administradon, la reprezentadon, la propagadon, la pritrakton kaj elmontradon de la organizaĵo gvidlinioj kaj la aranĝon de kunvenoj kaj kongresoj. Tiucele ĝi havas tutlandan kaj lokajn aŭ distriktajn estrarojn, aperigas gazeton kaj pli-malpli regule kunvenigas siajn membrojn.

Esperanto-organizaĵo havas la specialan taskon propagandi tutmondan lingvon, havigi la eblojn por praktike uzi ĝin, varbi novajn adeptojn kaj konservi malnovajn. Konsiderante la rezultojn, akiritajn de la Esperanto-societoj en nia lando, mi opinias ilin nekontentigaj. Laŭ membronombro kelkaj asociaj estas ĉiutagaj, la kresko stagnas aŭ estas sensignifa kaj la membroperdo egalas, kelkfoje eĉ superas la gajnon. Koncerne la gazetojn la situacio estas eĉ pli malbona; kelkaj el ili malaperis kaj aliaj baraktas kontraŭ financaj malfacilaĵoj kaj aperas neregle. Fakaj grupoj klopodas kontentigi siajn membrojn per stencilitaj folioj, kiuj kelkfoje aspektas malbonaj kaj ofte enhavas gravajn lingvajn erarojn. Kelkaj fakaj grupoj, al kiuj oni aliĝis pro iu kvazaŭ morala devo (oni ju estas esperantisto!) donas kiel ununuran vivosignon kasistan pagordon.

La diversaj taskoj, kiujn mi ĉi-supre menciis, postulas la tempon kaj energion de multaj landaj kaj lokaj funkciuloj. La nombro da personoj, disponantaj pri tiuj bezonaĵoj estas en nia movado ne pli granda ol en alia, eble pli malgranda. Ili ja bezonas kaj bezonadas parton de ili por akiri la necesan scion pri Esperanto kaj konservi ĝin. Neniu neos la fakton, ke estas ege malfacile, kelkfoje eĉ neeble, trovi taŭgajn funkciulojn. Kaj kiam ili fine estas trovitaj, ili devas malŝpari sian tempon por plenumi bagatelaĵojn kaj laboretojn, kiujn ofte povas plenumi juna komizo. Ne miru, ke novelektitaj funkciuloj seniluziigas, kiam ili spertas, ke por la efektiveco de la de ili sopirata celo mankas ne nur la mono, sed ankaŭ la tempo, ĉar ne forgesu, karaj gelegantoj, ke ili devas fari la organizaĵan laboron en la malmultaj horoj, kiujn la profesia laboro lasas libera.

Regula aperigo de asocia organo, eĉ de simpla malgranda folio, postulas multon. Ofte la redaktoro verkas sola, kolektas materialon, legas aliajn gazetojn por havigi al la legantaro ion interesan kaj legindan. Kelkfoje okazas, ke la komputindulo krome persone devas prizorgi la adresadon!

Gesamsideanoj, gekamaradoj, geamikoj, gesamcelanoj aŭ kiel ajn vi nomas vin, ĉu necesas daŭrigi la priskribon de la movado en nia lando? Se iam ŝajnis al vi, ke mi ofende skribis pri via asocio, pri viaj funkciuloj aŭ viaj estraroj, bonvolu kredi al mi, mi ne volis ofendi iun kaj malpleje vin.

Multfoje mi cerbumis pri tiu nekontentiga stato kaj klopodis trovi vojon al plibonigo. Antaŭ kelke da tempo mi publikigis mian opinion kaj vi ĝin konas. Mi defendis la plej firman koncentrigon de ĉies fortoj.

### TAGO DE LA LIBRO.

Ĉu ankoraŭ necesas rememorigi niajn legantojn pri la «tago de la libro»? Ni kredas, ke ne! Laŭ propono de Julio Baghy honore al la aŭtoro de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, la 15-a de decembro ja fariĝis «tago de la libro», ĉe kies okazo ĉiu esperantisto havas la moralan devon aĉeti minimume unu libron! Komprenable neniu el vi forgesos sian moralan devon. Atente legu la anoncon de la libro-servo, kiu oferas al vi bonegajn verkojn je reduktitaj prezoj. Profitu la okazon kaj rapide sendu vian mendon al s-ro H.A. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom aŭ al V.E.I. Steenw. op Blankenberge, 72, Brugge!

Ĉu vi iam pripensis, kiel nia «multkapeco» impresas eksterulojn? Mi estas konvinkita, ke via respondo ne povas esti alia ol «malbone». Sed la lastan tempon mi ofte timis, ke ĝi neniel impresas ilin. Nomu nian tempon grandioza, groteska, haosa, tumulta aŭ kia ajn vi deziras, nia propagando, nia laboro perdiĝas ie en la amaso da antagonismoj kaj aliaj «ismoj». Mi troigas, jes, vi pravus. Ankaŭ mi konas la proverbon «eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan». Efektive ĝi faras tion en la daŭro de centmiloj da jaroj. Sed en nia tempo oni uzas pneŭmatikan borilon por «trabori la graniton» ĉe la konstruo de nova vojo kaj se la laboro urĝas, eĉ dum la nokto la ĝena bruado ne haltas. Fama samideano gvidos kurson en la universitato! Nia Esperanta koro kvazaŭ krevas pro ĝojo kaj fiero kaj ni rapidas diskonigi la novaĵon tra la tuta lando. Kaj la publiko, la eksteruloj? Ili aŭdas, legas kaj... forgesas. Jen eĉ guto! Sed, ĉu konstante frapanta? Ne, ĉar por tio mankas al ni la mono, la forto, la tempo kaj la kompetentuloj.

Mi firme konvinkigis, ke la nuna stato estas malbona kaj malindas la gloran celon. Kaj mi ĝojos, kiam evidentigos, ke post lego de mia artikolo ankaŭ aliaj konvinkigos pri la maltaŭgeco de la nuna stato.

Dumil-ducent-kaj dudekmembraj organizaĵoj de samcelanoj forĵetas la (malmultan) herbon antaŭ la piedoj de la aliaj kaj konkurencas unuj la aliajn. Kelkfoje, antaŭ la de la diversaj rezultoj de la intencita displitigo, ili klopodas entuziasme krampi la antaŭe kaŭzitaĵojn. Tiam aperas sur la Esperanto-scenejo ia centra komitato, nova organizaĵo, kiu havas siajn postulojn rilate monon, tempon kaj kompetentulojn gvidantojn. Ĝi ekigas kaj dum kelka tempo la nova aparato kontentige funkcias dank' al singarda kaj prudenta ekvilibro de fortoj, influoj kaj deziroj de la

ektimigitaj gvidantoj. Sed ho ve, eĉ la plej granda kaj honesta zorgemo ne povas malhelpi, ke la veneno de organiza egoismo malbonigas la maŝinoleon kaj reciproka malfido, komence nerimarkebla, iom post iom haltigas la radaron.

Mi riproĉas nenion kaj nenion; mi nur konstatas. Se mi erarus, tiom pli bone! La enstelado de la veneno estas tre homa, tre klarigebla kaj neevitebla fenomeno. La kunlaboradon, planitan kun la plej bona volo kaj la alla esperantista celo antaŭ la okuloj ja devas plenumi homoj, kies ĉiutaga devo estas la defendo de la intereso de la propra organizaĵo. Kiel gardistoj ili staras antaŭ la propra kastelo kaj mi volus laŭdi ilin pro ilia fideleco. Volus, se nur ne la suma alligiteco blindigus ilin antaŭ la elvokitaj danĝeroj.

Kion mi do volas? Ke ankaŭ aliaj konsideru la staton de nia movado de alta elrigardejo kaj diru sian opinion kaj serĉu solvon.

Mi esperas, ke la fina, sed ne tro malfrua rezulto estu unu tutlanda Esperanto-organizo, kiu ampleksos ĉiujn fakajn, profesiajn aŭ kiajn ajn esperantistajn grupigojn. La administrado estu koncentrita kaj la organizaĵo havu unu indan reprezentantan varian gazeton. Ĝi havu laŭbezone fakajn sekciojn kaj lokajn grupojn preskaŭ memstarajn. Sed ĉiu ĝia membro sin sentu unuvaloke esperantisto kaj membro de la centra organizaĵo. La ĉefestraro aŭ plenuma komitato havu reprezentantojn de ĉiuj gravaj fakoj kaj tendencoj kaj nepre nombri sufiĉe da personoj por liberigi almenaŭ kelkajn el ili por la vera gvidanta tasko. Mi ne vidas jam nun la eblon de pagita, profesia administrado, sed ĝi estas beno por la movado.

La ununura gazeto prizorgu la bezonojn de la diversaj fakoj kaj tendencoj. La interesojn de membrogrupoj kaj la tutaj oni pesu kaj komparu.

Forigu la venenon!

P. W. Baas.

### VERDLANDO VOKAS (VIII — 30-10-1950)

Listo de radio-dissendo en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Temp-indiko laŭ M.E.T. (= mez-eŭropa tempo), valida ankaŭ en Nederlanda kaj Belgujo.	
Mallongigoj: I = Informoj; P = parolad(et)o; K = kurso; M = Muziko.	
<b>Ĉiutage</b>	19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : I kaj P.
<b>Dimanĉe</b>	17.00-17.20 Romo, 19,5 m., 31,1 m. : I kaj M.
<b>Lunde</b>	6.30 - 6.35 Vieno, 25 m., 41 m., 48 m., 513 m. : I.
	8.15 - 8.30 Stokholmo, 19,80 m., 49,46 m. : I.
	8.45 - 9.00 Lille, 235 m. : P.
	16.15-16.30 Stokholmo, 19,80 m., 27,83 m. : I.
	17.30-18.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m. : K.
	23.15-23.20 Hilversumo II, 298 m., V.A.R.A. : I.
	(Nur ĉiudusemajne : 13-11-1950 k.t.p.).
<b>Marde</b>	2.15 - 2.30 Stokholmo, 19,80 m., 27,83 m. : I.
	12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Arthur Baur.
	18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,46 m., 48,66 m. : Vidu : 12.55 h.
<b>Merkrede</b>	0.45 - 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I.
	9.30 - 9.45 Parizo, 48,39 m., 347 m. : K.
<b>Ĵaŭde</b>	12.55-13.00 Berno, 13,94 m., 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj mondpaco.
	18.40-18.45 Berno, 19,60 m., 31,36 m., 48,66 m. : Vidu : 12.55 h.
<b>Vendrede</b>	17.00-17.20 Romo, 19,5 m., 31,1 m. : I kaj M.
	18.15-18.30 Hilversumo I, 402 m., N.C.R.V. : P.
	(Nur unufoje en du monatoj). 15-12-'50 : s-ro C. P. Brakké pri : «La tago de l' Libro». La muzikan enkadrigon prizorgos Jelly Koopmans-Schotanus (solkantado) kaj Meindert Boekel (akompano per orgeno).
<b>Sabate</b>	23.15-23.20 Hilversumo, 402 m., K.R.O. : I.

#### INFORMOJ KAJ PETOJ :

Prago silentas en Esperanto : La E-lingvaj dissendoj de ĉeĥoslovaka radio, rekomencitaj en sept. 1945, estis ĉesigitaj samtempe kun multaj alilingvaj, same kiel en la pariza radio. Skibu multnombre al ĉeĥoslovaka Radio (Esperanto-fako), Stalinova, 12 Praha XII, CSR, por revivigi la tre aŭskultindan Verdán Stacion. Skribu afable. Multe valoros via peto.

«Katholieke Radio-Gids» publikigos la informojn de nia Servo.

V.A.R.A. denove regule dissendas en Esperanto. La supra listo montras ke ĉiudualunde V.A.R.A. regule dissendas informojn en Esperanto tuj post la lastaj novaĵoj de A.N.P. Bonvolu aŭskulti kaj sendi kuragiĝan skriban aplaudon al V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.

Radio ROMA regule dufoje semajne dissendas en Esperanto.

Nepre ne forgesu aŭskulti dimanĉe kaj vendrede la Esperanto-disaŭdiĝojn de Radio Roma. La dissendo okazanta la lastan dimanĉon de ĉiu monato estas aparte destinata al respondoj al radio-aŭskultantoj.

La dissendo okazanta la duan vendredon de ĉiu monato estas destinata al la disaŭdiĝo de muzikaĵoj petitaj de la radio-aŭskultantoj.

Novaj ek silento kaj... redisaŭdiĝo en Esperanto!

Nun ankaŭ Varŝavo ĉesigis siajn elsendojn en Esperanto. E.v. skribi al Radio Warszawa, Koszydowa, 8, Warszawa (Pollando). Sed Rijsel (Lille) denove havas Esperanto-radioprogrameron. Vidu supre : Lunde.

S. S. de JONG Dzn, Radio-Servio N.C.K.E., Waltaweg, 3, TIERJWERD (Fr.), Nederlando.

## Wereldnieuws

De heer G.F. Makkink geeft momenteel een Esperanto-cursus aan de Landbouwhogeschool in Wageningen, waarvoor een bevredigende belangstelling bestaat.

Aan de Rijkskweekschool te Utrecht wordt een Esperanto-cursus gegeven onder de gewone schooluren, waaraan door 28 leerlingen van de eerste en tweede klas wordt deelgenomen. Cursusleidster is mevr. J. Koopmans-Nauta.

De Internationale Bond van Onderwijzers-Esperantisten heeft aangesloten verenigingen in Engeland, Frankrijk, Duitsland, Nederland en Zweden en bovendien vertegenwoordigers in 18 andere landen.

Op een vergadering van wetenschappelijke onderzoekers in Tokio werd besloten, een medisch tijdschrift in Esperanto uit te geven.

«De Typhoon», dagblad voor de Zaanstreek is begonnen met het publiceren van een Esperanto-cursus.

De regering van Beieren en het stadsbestuur van München hebben het 36-ste Esperanto-Wereldcongres uitgenodigd te München. De congresbezoekers genieten vrij vervoer in de openbare verkeersmiddelen van de stad München.

Het ministerie van opvoeding in Japan heeft aan een drietal studenten in de Esperantologie 20.000 yen toegekend voor cultureel-wetenschappelijke studies.

In de Veren. Staten wordt Esperanto onderwezen aan vijf universiteiten.

Het Oostenrijkse ministerie van onderwijs heeft aan het Internationale Esperanto-Museum te Wenen voor het jaar 1950 een subsidie van 6.000 sh. toegekend.

Facultatieve Esperanto-cursussen worden dit jaar in Frankrijk plaats aan de kweekscholen te Parijs, Chalons-sur-Marne, Valence, Lyon, Tours, Besançon, Versailles en Toulouse.

De bekende uitgeverij «Iwanomi» in Tokio heeft een 240 blz. tellende biografie van Zamenhof uitgegeven.

In Eindhoven werd een Esperanto-vereniging opgericht, bestaande uit leden van «Philips»-personeel. Staande de oprichtingsvergadering meldden reeds 75 zich als lid aan.

De «Assemblée Mondiale des Peuples» te Genève heeft Esperanto aangenomen als hulptaal voor de eerst volgende zitting die 30 Dec. a.s. aan zal vangen.

### Hoekje van de Penningmeester :

Dit nummer is het laatste van het bondsjaar 1950. De twaalf voorbije maanden waren uit een oogpunt van organisatie verheugend. Alleen het aantal abonnementen moet verhoogd worden. Wij zijn derhalve overtuigd van de trouw onzer leden, die zonder verwijl hun bijdrage zullen regelen, nog meer, de belangstelling voor Esperanto bij vrienden en kennissen opwekken, en aanzetten onze beweging te steunen, door ofwel steunend lid, of abonné of vriend van de V.E.B. te worden. Stort dus onmiddellijk op P.C.R. 232150 V.E.B. Brussel de bijdragen als volgt :

Leden (met F.E.)	75 fr.
Inwonenden (met de Esperantist)	25 fr.
Steunende leden : minstens	150 fr.
Vrienden (met de Esperantist)	20 fr.
Jongelieden, tot 18 jaar	
(met F.E. en La Juna Vivo)	50 fr.
Jonge lieden van 18 tot 21 j.	
(met F.E.)	50 fr.

Wie dus het volgend nummer van F.E. wenst te ontvangen, betale voor 1 Januari 1951; na die datum wordt door de post gedisponeerd; onze leden zullen bereidwillig die onnodige kosten ons besparen. Dank.



# OBSERVOJ

ESPERANTO KAJ BESTOPROTEKTO.



La bestoprotektaj societoj mondkongresis en Hago. Nuraj kongreslingvoj estis la Angla, Franca kaj Germana. Flandra societo proponis ke ankaŭ la Nederlanda, la lingvo de la gastigantoj, estu allasata, kiel okazas kutime ĉe internaciaj kunvenoj uzantaj plurajn lingvojn. Pretekstante skrupulan gentilecon la estraro ne konsentis, kaj la flandra societo retiriĝis...

Tamen la kongreso eklaboris kaj dum pluraj tagoj bonintencaj homoj en Hago trilingve defendis la « malsuperajn estulojn » kontraŭ la krueleco de la « reĝoj de la kreitajaro ». Sed ili tiamezure spertis lingvajn malfacilaĵojn, ke finfine rezultigis rezolucio favore al Esperanto!

Nun la tuta animalaro gravediĝas je unu granda espero : la bela rezolucio ne restu nura bonintencajo!

PIK.

## OVER EEN JUBELKONGRES.

Het Internationaal Jubelkongres van de Katholieke Arbeidersjeugd (K.A.J.) verzamelde in het najaar te Brussel honderdduizend deelnemers. Daarover zijn geestdriftige en roerende verslagen in de pers verschenen : « Het werd een geestdriftige verbroedering tussen onze Kajotters en de afgevaardigden uit Engeland, Amerika, Frankrijk, Duitsland, Portugal en Italië. Niet altijd kon men mekaar best begrijpen, maar dank zij gebaren en een gulle glimlach wisten brave jonge arbeiders uit Vlaanderen onmiddellijk vriendschap aan te knopen met jonge arbeiders uit Haiti, uit Brazilië en andere overzeese landen » (De Standaard, Brussel, 4.11.50)

## EEN KINDERHAND

is gauw gevuld : gebaren en gulle glimlachjes is verbroedering ! Het wil ons voorkomen dat er wat ontbrak aan deze jeugd : één taal om op een dergelijk kongres werkelijk te kunnen verbroederen. Daarom hoeft ze niet te verzaaken aan eigen aard en taal : nooit gehoord van de internationale hulptaal Esperanto ?

## OVERBODIG

meent blijkbaar deze jeugd, die toejuicht en instemt al heeft ze geen jota ervan begrepen. Niet wij, maar « De Volksmacht » (Weekblad van de Christelijke Arbeidersjeugd, Gent, 16.11.50) zegt het : « Ideo Inohara (Japan) die uit zijn fabriek van 45.000 arbeiders is gekomen om na twee maanden reizen deze studieweek bij te wonen, heeft het vooral over de morele nood waarin zijn broeders gedompeld zijn. Alhoewel geen mens in de zaal een woord van zijn gehakte taal heeft gesnapt, valt hem een uitbundig applaus te beurt »

## IN ALLE TALEN

werd er op dit kongres door gebaren en glimlachjes verbreederd en ook gezongen, het ééne lied « Harop, Kajotters onvervaard... »

De dag dat de Katholieke arbeidersjeugd op dergelijke kongressen niet in alle, maar in één taal zal kunnen zingen en verbroederen zal de K.A.J. zich verdienstelijk hebben gemaakt om de Katholieke arbeidersjeugd nader tot elkander te brengen !

## NA DE GEÏARENTAAL, DE DANSTAAL!

Vrijwel alle verenigingen beroepen zich op het bevorderen van internationale toenadering en verstandhouding. Alleen hun middelen schieten te kort of zijn onafdoend. De K.A.J. probeerde het met gebaren, de VDCV (Volksdancentrale voor Vlaanderen) met... dansen : « Een internationale Jeugdherberg-Rally, waarop trekkers van verschillende landen mekaar over alle grenzen heen, in gulle kameraadschap de hand reiken, kenmerkt zich door het groot aandeel dat volksdans en -zang erbij innemen. Vooral de volksdans vervult er een voornaam rol. Hij is als het ware de tolk, de « universele taal », die alle taalverwarring overbrugt. Men kan hier gerust spreken van een « danstaal », want volksdans, hoe onderling verschillend ook, blijven bij alle volkeren een uitdrukkingvorm te zijn van levenslijheid en gemeenschapszin ».

Voorwaar, alle middelen zijn goed, maar niets evenaart een algemeen gebruikte taal om op een volwaardige manier te kunnen verbroederen. Deze geestdriftige jeugd probeert het eens met Esperanto, de internationale taal bij uitstek.

# LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer :

1. Bojantaj hundoj ne mordas. 2. Mi estis elironta, sed lastmomente mi estis malhelpata. 3. La leporo falis teren, trafite de kuglo. 4. Se mi ĝustatempe estus vekita, mi ne estus maltrafinta la vagonaron. 5. Mi gratulis la sukcesintan kandidaton. 6. La dronanto kriis por helpo ; feliĉe li ĝustatempe estis savata de pa-

uitgelezen gezelschap ; op zwart zaad zitten ; de wolken pakken zich samen ; het doel heiligt de middelen ; ik laat me niet commanderen ; een blinde muur ; komt tijd, komt raad ; te hard van stapel lopen ; de gelegenheid maakt de dief ; ongeluste kalk ; een samenloop van omstandigheden ; een dood spoor ; zijn hart luchten ; iets uitbazuinen ; vele kleintjes maken een grote ; iemand de les lezen ; met gepast geld betalen ; een on-

## MEDEDELINGEN VAN DE BOEKENDIENSTEN

De feestdagen naderen : Sint Nikolaas, 15 December, onze Boekendag ; Kerstmis.

Ter gelegenheid van deze feestdagen hebben wij enige speciale aanbiedingen. Ook een goede gelegenheid voor de afdelingen om hun bibliotheek voor weinig geld uit te breiden. Slechts tijdelijk aanbod. Na 10 Januari 1956 gelden deze prijzen niet meer. Dus haast U. Wie nu niet koopt, koopt nooit !

### SERIE A.

Sonĝo de Makaro van 35 c. voor 30 c.  
Mateo Falcone » »  
De Muheddin ĝis Mundilatin » 25 c.  
Tra Usono kun ruliĝanta hejmo » »  
El la Londona skizolibro » »

Dit zijn de prijzen als men 1 of meer exemplaren wenst te kopen uit deze serie. Maar... alle 5 samen van gld. 1,75 voor gld. 1,25.

### SERIE B.

Bona Sinjorino van 20 c. voor 15 c.  
La almozulino de la Pont des Arts 50 c. 35 c.  
Legolibreto de Borel 50 c. 15 c.  
Kursa lernolibro de Privat 65 c. 35 c.  
Sonĝo de Mukuro 35 c. 30 c.  
De Muheddin ĝis Mundilatin 35 c. 25 c.  
Deze gehele serie : gld. 1,50.

### SERIE C.

Ora jubilea kongreso 1937 van 35 c. voor 25 c.  
La jubilea kongreso 1912 » »  
Legolibreto de Borel 25 c. 15 c.  
Kursa lernolibro de Privat 65 c. 35 c.  
Deze gehele serie voor gld. 0,90.

Verder kunnen we nog afzonderlijk aanbieden :

Legolibro de Kabe van gld. 1 voor gld. 0,65  
Vivo de Zola van gld. 1,55 voor gld. 0,95  
Georgo Dandin van gld. 1 voor gld. 0,75  
Deze 2 laatste geschikt voor B. examen.

### ATTENTIE :

De bekende cursus van Hans Bakker, zeer goed te gebruiken als leerboek, kost bij ons : gld. 2,75 (Belg. Fr. 42.—).

### ZO JUIST VERSCHENEN :

« Vortoj kaj Esprimoj » de C. Zondervan : gld. 1,15.  
« Miru — Pensu — Ridu » la libro de la bona humoro. Verkisto P. Bennunann. La plej interesa libro iam eldonita en Esperanto. Favorprezo ĝis 31.12.1950 : gld. 4,80 (Belg. Fr. 65.—).  
« KREDU MIN, SINJORO ! » de Cezaro Rosselli. Romano originale verkita en Esperanto. Favorprezo ĝis 31.12.1950 : gld. 4,80 (Belg. Fr. 65.—).

Ten slotte nog een extra-koopje. De Boekendienst beschikt nog slechts over enkele exemplaren der hieronderstaande werken. Daarom werd de prijs geweldig verminderd. Bestel aanstonds zo U bij de gelukkigigen wilt zijn. Het aanbod geldt slechts tot einde December.

Aŭli	Belg. Fr. 25.—	Analiza historio de la E.movado	12.—
A.C. Andersen, liaj vivo kaj verkoj	18.—	Akbar	45.—
Anstataŭa edzino	35.—	Cu socialismo konstruiĝas en Sovetio ?	12.—
Amo kaj poezio	18.—	Ĉe la Sanktaj akvoj (2 volumoj)	60.—
Albrecht Dürer	18.—	La mistero de V sango id. (broŝurita)	35.— 22.—
Dekdu poetoj	35.—	La multe kolora libro	18.—
De paĝo al paĝo	40.—	Maria kaj la grupo	50.—
La du amatinoj	15.—	La nekonata konato (bind.)	35.—
La kapricoj de Mariano	15.—	La nevenkebla ĝeno	60.—
Diverskolora bukdedoto idem (broŝurita)	18.—	La ora libro	45.—
Du majstronoveloj	25.—	Originala verkaro	150.—
El la verda Biblio idem (bindita)	32.—		gld. : 11,25
Eterna bukdedoto	110.—	Pri la moderna arto	45.—
Ferio kun la Morto (gld. 2)	23.—	Patroj kaj Filoj	35.—
La fera kalkanumo	40.—	Palaco de danĝero	45.—
Fontamara	35.—	Pro Istar gld. : 4,50	55.—
La Faraono (E vol.)	110.—	Petrolo (2 vol.)	90.—
Fabiola	85.—	La ringo de la generalo	20.—
Faŭsto	80.—	Riĉa kaj sen mono	45.—
Historio kaj organizo de la E.movado	16.—	Roza Luksemburg	80.—
Internacia kantaro	50.—	Romano de San Michele	125.—
id. (de Bennemann)	15.—	Sur sanga tero	55.—
La Juda ŝtato	40.—	Tri homoj en boato	60.—
Kataluna antologio	110.—	La tragedio de l'homo	45.—
50 jarojn kun P. Nylan	20.—	La vagabondo kantas	22.—
Leteroj de E. Lanti	55.—	Vortoj de K-ro Lanti	35.—
Landoj de l'fantazio	38.—	La vojo returne	35.—

OPGELET : De verzendkosten voor koper !

Libro-Servo LEEN : Z.O. Singel, 5, Bergen op Zoom (giro 76915)  
V.E.I. Blankenberggesteenweg, 72, Brugge, (P.R. 3268.51).

santa policisto. 7. Lavite kaj manginte la infanoj iris al la lernejo. 8. La policano kondukis la arestitojn al la policejo. 9. La barburo sapumis la klienton, kiu estis razota. 10. Mi estus partopreninta la ekzamenon, se mi ĝustatempe estus resaniginta. 11. Mi vidis, ke la arboj, faligitaj de la arbhakisto, estis transportataj per veturilo. 12. Oni trovis la kadavron de la mortigito, sed ĝis nun oni ne sukcesis aresti la mortiginton. 13. Nur malrapide ni progresis, ĉar la tero estis kovrita de alta tavolo da umasiginta neĝo. 14. Li heredis la tutan havaĵon de la mortinto. 15. Kiam mi prenis la biciklon, la pneŭmatiko montriĝis krevinta.

Onsamenhande woorden ; een strikvraag ; op afbetaling kopen ; een hogedunk van zichzelf hebben ; een geijkte uitdrukking ; dat is van later zorg ; een

gepaste grap ; tot nader order ; gezichtsbedrog.

### Limigita toleremo.

« Mi ne trovas tre grave », diris la profesoro, « ke mi vidas, ke iu el miaj studentoj je (ĉe) la fino de la lekcio senpacienciĝas. Laŭ mia opinio eĉ ne estas grave, ke iu el ili aperigas sian poŝhologon kaj rigardas, kioma horo estas. Sed kiam iu elpoŝigas sian horlogon, rigardis ĝin kaj poste skuas ĝin, mi interne povas koleriĝi. »

### Komprenebla dubo.

Antaŭ ol la edzo enskribigis siajn dunnaskitojn (meervoud !) en la registron de la logantaro, li festis kun kelkaj amikoj la gravan okazintaĵon. Fine li ekpensis, ke estas urĝa tempo por plenumi la formalajn. Ŝanceliĝante li eniris la sl-

dejon de la komunumestraro kaj turnis sin al la unua vidata skribisto malantaŭ ĝiceto. « Sinjoroj », li komencis. « Ĉu sinjoroj ? », kun miro diris la viro malantaŭ la ĝiceto, « mi sidas ĉi tie tute sola ». « Nu » diris la feliĉa patro, grante sin malantaŭ la orelo, « tiuokaze mi prefere reiros por rigardi, ĉu efektive estas du. »

Hier volgt ter vertaling een gedeelte van de opgave Nederlands-Esperanto van het op 4 Nov. te Utrecht gehouden A-examen :

1. Esperanto is een eenvoudige taal, toch heeft men enige jaren nodig, om haar voldoende te kennen. 2. Onze taal wordt mondeling en schriftelijk gebruikt in alle werelddelen. 3. Als je in het buitenland komt, zorg dan direct in contact te komen met daar wonende geestverwanten. 4. Wees voorzichtig, dit glas is zeer breekbaar. Ik heb al vijf glazen gebroken. 5. Wanneer U ook komt, U bent steeds welkom. 6. Als ik vroeg klaar was, liep ik door de bossen naar huis, maar het zal wel weer laat worden. 7. Wij zouden juist gaan eten, toen onze buurman aanbelde. 8. Vindt hij zijn nieuwe boek mooi ? Ik zocht het mooiste voor hem uit.

Unu el la frazoj, kiujn la kandidatoj devis traduki, tekstis jene : « Na allen gegroet te hebben, vertrok hij naar Parijs, waar hij zijn vacantie zou doorbrengen ». Preskaŭ ĉiuj kandidatoj tradukis : « ...kie li pasigus sian ferion (libertempo) », sed ĉi tie ja ne temas pri kondiĉa modo ! Pri tiu eraro kulpas la elementaj lernolibroj, kiuj ne klarigas sufiĉe la kondiĉan modon. La ĝusta traduko estas : « kie li estis pasigonta sian ferion ». La plej « eleganta » traduko de la unua parto de la frazo estas : « salutinte ĉiujn », sed korektaj estas ankaŭ jenaj tradukoj : « post kiam li salutis ĉiujn » kaj « kiam li estis salutinta ĉiujn ».

La ĝusta apliko de la prepozicio po kaŭzis multajn malfacilaĵojn. Pluraj kandidatoj tradukis la frazon « Deze appels kosten 50 cent per pond » jene : « ĉi tiuj pomoj kostas kvindek cendojn po funto », sed po ne estas la traduko de la nederlanda per ; la ĝusta traduko estas : « tiuj ĉi pomoj kostas po kvindek cendojn po funto ».

Vul in : as, is, os, us, u of i :

1. Mardon ni far— ekskurson al Haarlem, almenaŭ se la vetero tiam est— bela. 2. Se mi estu— riĉa, mi aĉet— novan biciklon. 3. Silent— anstataŭ parol— pri aferoj, kiujn vi ne kompren— ! 4. Hieraŭ li promes— al mi, ke li help— min, do li certe ven— tuj kiam li est— fininta sian laboron. 5. Jus mi renkont— mian eksnajibaron, kiu nuntempe loĝ— en Brugge. Li rakont— al mi, ke li tre ŝat— sian novan loĝlokon, sed ke li tamen reven— al Amsterdam, tuj kiam li tie pov— trov— taŭgan oficon.

Hier volgt ter vertaling een fragment van de opgave Nederlands-Esperanto van het te Utrecht afgenomen B-examen :

### Ruilmiddelen.

Zelden komt het voor, dat het ene artikel rechtstreeks geruild wordt tegen het andere (ruil in natura). Wij zijn gewoon, een voorwerp, dat wij tegen een ander wensen te ruilen, te verkopen en met de koopprijs ons het voorwerp aan te schaffen, dat we begeren. Ruil in natura is zeer lastig, ten eerste, omdat wij iemand moeten zoeken, die begeert wat wij willen missen en wil afstaan, wat wij nodig hebben ; ten tweede, omdat degene, die het begeerde artikel aan ons wil afstaan, mogelijk daarvan niet genoeg bezit om de ruil voor ons aannemelijk te maken. Wij zouden dan slechts een deel van ons eigendom in ruil willen geven ; doch niet elk goed is deelbaar. Vandaar, dat alle volken reeds vroeg een ruilmiddel hebben ingevoerd, d.w.z. een artikel, dat algemeen wordt gebruikt, zodat ieder het aanneemt in ruil voor iets anders en dat in verschillende hoeveelheden kan worden geleverd. Onbeschaafde volken gebruiken als ruilmiddel nog dergelijke goederen (slaven, schapen, mais, olie, schelpen). Schoolkinderen gebruiken griffels als ruilmiddel. Het ruilmiddel moet niet alleen een voorwerp van algemeen gebruik zijn, doch bovendien niet te zeer onderhevig aan verandering van waarde. Anders zou men verlies kunnen lijden, wanneer men de ruilmiddelen, waartegen men zijn eigendom heeft afgestaan, later weder in goederen omzet.

Aan deze voorwaarden voldoet het geld, een ruilmiddel, vervaardigd van goud of zilver.

Bij het inzenden van taken ter correctie alléén de rechterhelft van het papier beschrijven a.u.b. Indien postzegel voor antwoord wordt bijgevoegd, ontvangt men de taken gecorrigeerd terug.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 December aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel ; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.



**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. « LA ESTONTO ESTAS NIA »**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst : Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160. Penningm. : P. M. Mabeosone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563. Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915. Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht. Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320. Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom. Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermewest. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

**KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO**

Proponoj por la ĝen. jarkunveno atingu la ĝen. sekretarion plej malfrue je la 15-a de decembro, ĉar la 16-an kaj 17-an de decembro okazos ĉefestrarkunveno en Amsterdam, dum kiu estos pritraktataj la ricevitaj proponoj.

Ĉiuj sekciaj sekretarioj ricevis demandaron, por faciligi al ili la kompiladon de raporto pri la jaro 1950. Bonvolu ĝustatempe kompili la respondojn kaj la membrolistojn, karaj gesekretarioj, ĉar se ni ricevos ilin post la 10-a de januaro, vi kaŭzos al ni multan ĝenon kaj malfaciligos nian taskon.

La 28-an de novembro sekcio « Den Helder » festis sian 30-jaran ekziston. Ni kore gratulas la jubileantan sekcion kaj deziras al ĝi fortan kreskon!


Informiloj pri la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos 4-11 aŭg. 1951 en München kaj aligiloj estas senpage haveblaj ĉe la ĝen. sekretario de L.E.E.N. kaj F.L.L.E.

**U.E.A.**

Por ke vi seninterrompe ricevu la monatan revuon « Esperanto », jam nun pagu vian kotizon por la jaro 1951 al la ĉefdelegito s-ro P. Moen, Schaarsbergenstr. 104 Den Haag per poŝtkonto 79167.

Kotizoj : M.J. g. 2,75 ; M.A. g. 6,75 kaj M.S. g. 13,50 ; por anoj de L.E.E.N. resp. g. 2,50 ; g. 6,50 kaj g. 13,25. La unua parto de la jarlibro 1951 aperos jam en januaro. « Esperanto » aperos en nova formato de la konata « Digest » (20,5 x 14 cm) kaj ĉiu numero ampleksos 32 pagojn. Ĝi enhavos gravajn informojn pri la movado el la tuta mondo, interesajn artikolojn pri ne Esp.-temoj kaj altnivelajn kaj popularajn literaturajojn.

**L.E.E.N. — F.L.L.E. AL HILVERSUM !**



Hilversum situas en Nederlando kiel la koro en homa korpo kaj en ĝi same pulsas la vivo. Origine nur malgranda vilaĝo, loĝloko de malriĉaj teksistoj, ĝi en relative mallonga tempo mirige evoluis al granda ĝardenurbo, kie vivas kaj laboras nun preskaŭ 90.000 homoj. Facile atingebla per vagonaro, aŭtobuso, aŭto kaj eĉ per biciklo ĝi fariĝis la perlo de la regiono «Gooi», centro kien kondukas bonaj ŝoseoj kaj ĉarmaj biciklovojoj. Kiel ajn vi venos al Hilversum, certe vi ĝuos la belecon de nia pentrinda « Gooi ».

Hilversum estas ideala urbo kun multaj modernaj konstruaĵoj, kiel atestas la supra skizo de la urbdomo. Ĝian belegan arkitekturon la interesigantoj povos admiri tiel eksterne kiel interne.

Hilversum estas la urbo, kiu loĝas. Loganta pro siaj vidindaĵoj, loganta ankaŭ pro nia Benelux-kongreso de la 12-a — 14-a de majo, kiam en ĝi kunvenos centoj da gesamideanoj el Nederlando kaj Flandrujo.

Dum tiuj tagoj nia lingvo estu aŭdata ĉie en Hilversum, la urbo, kiu ofte gastigas eksterlandanojn kaj nun preparas sin por inde akcepti la esperantistojn el la suprenomitaĵoj landoj. Ĝia loĝantaro rimarku, ke Esperanto vivas kaj tion ni atingos per multvizitata kongreso.

Ne prokrastu vian aliĝon, ĉar nia devizo estu : antaŭ la 31-a de januaro almenaŭ la unua cento estos anoncinta sin. Aliĝilon vi trovos en la venonta numero.

Ĉar en Hilversum estas nur kelkaj malmultekostaj pensioj, vi sendu la aliĝilon kiel eble plej rapide, se vi volas profiti ilian favoran prezon.

Kongresejo : Hotelo « Santbergen », Noorderstraat 2, Hilversum. Sekretariino de la L.K.K. : f-ino S. Visser, Galileistraat 42, Hilversum.

Kongresa poŝtkonto 378964, de f-ino S. Visser.

Sekciaj estraroj, instigu viajn anojn al partopreno kaj ĝustatempe aranĝu ŝparkasojn por ebligi partoprenon al kiel eble plej multe da personoj !

**U. E. R. A.**

Woensdag 10 October werd te Amsterdam opgericht de Universitata Esperantista Rondo Amsterdama, met het doel meer bekendheid te geven aan de wereldtaal Esperanto onder studerenden aan de beide Amsterdamse universiteiten en het gebruik van deze taal bij wetenschappelijk buitenlands contact, wetenschappelijke publicaties etc. te bevorderen. Lid kunnen worden studenten aan de Amsterdamse universiteiten en te Amsterdam wonende afgestudeerden, onverschillig van welke hogeschool of universiteit. De jonge vereniging heeft reeds een tentoonstelling georganiseerd in het Hugo de Vries-Laboratorium om de studenten attent te maken op de colleges, welke door mr. S. Pragano aan de Gem. Universiteit gegeven zullen worden. Esperantisten, die met het doel van U.E.R.A. sympathiseren kunnen hun donaties storten op postrek. 13500 van het Gem. girokantoor te Amsterdam. Op het girostrookje vermelden : ten behoeve van rekening S 10108 ten name van S.A. ten Seldam, secr. U.E.R.A., Middenweg 117 bov. Amsterdam-O. Alle giften, hoe klein ook, worden in dank aanvaard.

**LOTERIJ No So BE**

Uitslag van de verloting, gehouden ten bate van No So BE (de Nederlandse vereniging van blinde esperantisten) : Het heren-polshorloge werd gewonnen door lot « 1 uur, 39 minuten en 32 seconden » ; het dames-polshorloge door lot « 9 uur, 21 minuten en 52 seconden ». Na ontvangst van de betreffende loten, welke aangetekend moeten worden verzonden aan R. Israëls, « Nia Hejmo » Tweede Exploermond (Dr.), zullen de prijzen aan de winnaars worden toegesonden.

La junularo, de « Touring Club de France » deziras korespondi kun nederlandaj gejunuloj. Temoj : kampado, ekskursoj, vojaĝoj kaj vizitado de vidindaĵoj. Adreso: Esperanto-Grupo de « TOURING CLUB DE FRANCE », 65, Avenue de la Grande Armée, Paris XVI, France.

Leerboek van Esperanto de s-ro F. Randi, eld. de Witteryck, Brugge. Prezo b.f.r. 30,—

Kvankam ĉi tiu lernolibro laŭ la gramatika metodo ampleksas nur 94 pagojn, la aŭtoro sukcesis en nur 13 lecionoj klarigi preskaŭ ĉiujn gramatikajn, kiujn la kandidatoj por la Ned. Akzamenon devas scii, sed la densa kompostado malfavore influas la klarecon kaj diversloke la gramatikaj reguloj kaŝiĝas en sufiĉe longa teksto kaj ne tuj « saltas en la okulojn ». Per trafaj ekzemploj la aŭtoro atentigas pri la logikeco de la reguloj kaj la facileco kompare kun aliaj lingvoj, sed ĉu la konjugaciaj tabeloj sur pagoj 53-59 ne iom timigos la studentojn ? La mallongajn formojn kia « mi puntas » (= mi estas punta) oni prefere ne pritraktu en lernolibro por komencantoj. La vortlistoj estas iom longaj ; prefere oni donu minimuman vortprovizon ; legante, la studentoj ja poste pligrandigos sian vortrezoron. Interese estas, ke s-ro Randi ofte uzas citaĵojn de famaj filozofoj, verkistoj, k.t.p. anstataŭ tedajn frazojn. Ni renkontis diversajn kritikindaĵojn, ekz. la formon plejeble, kiun la aŭtoro preferas al kiel

**Flandra Ligo Esperantista**

**RAPORTO PRI LA ĜENERALA KUNVENO EN BRUSELO LA 19.11.50**

Je kvarono antaŭ la tria posttagmeze, la ligo Prezidanto, S-ro De Brouwere, malfermis la statutan ĝeneralan ligkunvenon en hotelo « Monico ». Li bonvenigis la ĉeestantojn, inter kiuj estis sekciaj delegitoj kaj lokaj reprezentantoj el Antverpeno, Blankenberge, Bosvoorde, Brussel, Brugge, Gent, Kortrijk, Mechelen kaj St. Pieters-Leeuw. Li tamen bedaŭris ke ne ĉeestis pli da interresuloj por tiu jarkunveno.

La tagordon komencis la raporto pri la financa situacio. S-ro De Keyzer komunikis ke la enspezoj superis la elspezojn por la unuaj dek monatoj de la jaro. Oni ankaŭ ekscias ke S-ro De Keyzer pro profesiaj kialoj dezirus anstataŭon kiel kasisto. Tamen li pretas ankoraŭ daŭrigi, ĝis la komenco de la nova jaro.

La ligo sekretario, S-ro Maertens, poste skizis en detala raporto, la agadon dum la pasintaj monatoj. La ĉefaj punktoj el ĝi estas :

1. Eventuala aldono de 2 pagoj al nia revuo kelkfoje en la jaro, ne eblis pro financaj kialoj.
2. La buĝeto antaŭvidis elspezojn por tiu afero sed ne kalkulis je granda deficyto de nia kongreso en Oostende kaj la granda plialtiĝo de la prezo de la papero.
3. Eksto de novaj sekcioj en Roeselare kaj Izegem.
4. Insista peto por ke nia Ligo foje organizu la someran kurson en kunlaboro kun L.E.E.N., sur nia teritorio.
5. Alvoko por multopa karavano al Hilversum.

Sekvanta punkto sur la tagordo temis pri F.E.I. (Flandra Esperanto Instituto). La translokiĝo de la Instituto de Antverpen al Brugge nun tute enordigis kaj la P.C.K. jam funkcias je la nova adreso. La ligo prezidanto sincere dankas S-ron Cortvriendt, kiun dum tiom da jaroj tiel fervore dediĉis sian tempon kaj energion al la Instituto. Li esperas ke la anstataŭanto same faros. Ĝis nun oni povis kalkuli je proksimume 2.000 Fr. da ĉiujara profito. Tiun profiton oni uzis por stoki kiam eble plej diversajn verkojn : tiel nia Instituto igis modela Libro-Servo. Se iĝas necese, ĝi finance povos subteni la Ligajn entreprenojn.

La ĝenerala kunsido decidis ke ekde Januaro 1951 la revuo povos esti presata en Nederlando, se LEEN (kiel cetere konfirmiĝis) sukcesos kontrakti kun konvena presisto. Tial ke la preskostoj estos malpli multekostaj kaj la papero pli bonkvalita, ni akiris tiel almenaŭ du avantaĝojn. En la priparolado de la revuo, nia redaktoro esprimas la deziron ke pli multaj ligoj sendos kontribuojn.

S-ro Couwenberg poste raportis pri UEA kaj nia situacio en ĝi. Estas membro-gajno ; tamen ne sufiĉas ; oni prefere fariĝu membro-abonanto. Nia Ligo akiris sukceson : ni efektive havos niajn proprajn delegitojn en la komunumoj (kun tiucela indiko en la Jarlibro) se ambaŭ koncernaj Ligoj proponas alian personon.

Rilate al nia venontjara kongreso, ni ekscias ke ni kunlaboros kun LEEN, kiu tial prokrastis sian kutiman Pasko-kongreson ĝis Pentekosto. Estas kompreneble la nepra devo de niaj ligoj multnombre ĉeesti tiun kongreson, kiu estas la unua kune organizata : nia kunlaboro ne estu vana vorto ! Komunaj vojaĝbloj estas pristudataj kaj planataj ; detaloj sekvas.

Ĉar kongreso ekster la flandra lingvoteritorio ĝis nun ne estis antaŭvidata en

la organiza regularo, la sekretario proponis kaj la anaro unuanime akceptis la aldonon de plia artikolo, kiu celas reguligi la transliman kongresadon.

La amiko-varbado, la unuan jaron, estis sukcese sed poste malpli. Tial necesus alia sistemo de varbado. Per la nova metodo oni donacos « De Esperantist » al la amikoj kaj ili pagos 20 Fr. po jaro. Tiu tuta sumo estos por la Ligo.

Ĉar krom la komitatano el Oostende (kiu ne ĉeestis) ĉiuj aliaj estraranoj reakceptis la pezan taskon (nur S-ro De Keyzer sub rezervo) la elektadoj glute kaj rapide okazis. La sekretario petis al sekcio Oostende proponi novan kandidaton.

En la diversajoj de la tagordo oni pritraktis jenajn temojn :

1. Eventuala vojaĝo al kaj paroladoj en nia lando de D-ro Y. Lapenna. La kostoj de la vojaĝo ekde de landlimo, 1 L po tago kaj la tranoktado kaj manĝado estas postulataj. Li prefere parolos pri U.E.A. aŭ pri la landoj Francujo, Islando, Anglujo, Jugoslavio.
2. La koresponda kurso : po jaro 15 ĝis 20 personoj sekvos lecionojn per letero. Do estas rekomendinde fari propagandon ankaŭ en « Flandra Esperantisto ». Estus ankaŭ dezirinde posedi por tiuj kursoj lerno-libron ne tro rigide gramatikan. Flandra Ligo pristudu la eblon havigi iun kurso-libron kiu pli taŭgus por la Flandroj.
3. Nia reprezentanto el Bosvoorde S-ro Loeckx sciigas ke V.T.B. pretus eldoni Esperanto-lernolibron se nur Flandra Ligo zorgus por la teksto. Tamen mankas ankoraŭ la necesaj detaloj. Nia reprezentanto informiĝos pri ili ĉe V.T.B.
4. Ankaŭ eldono de prospekto, pri Belgujo, en Esperanto estas planita. S-ro Struye, principe jam akordigis. Iom post la sesa finigis la ĝenerala kunveno kiu denove kontribuis iom al la kreskado de nia Ligo kaj movado. La protokola sekretario.

Por la varbado de « Amikoj » ni disponas ankoraŭ pri kelkaj ekzempleroj de « De Esperantist » (No 3). Por la kotizo de 20 Fr. la « Amiko » ricevas i.a. la jarkolekton de tiu ege interesa propagandilo.

Ni petas al ĉiuj ligoj kiuj organizis kurson ĉi-vintre komuniki jenajn sciindaĵojn al la sekretario :

1. Loko kaj tago de la kurso ?
2. Kiom da gekursanoj ?
3. Lernolibro ?
4. Instruisto ?
5. Farita propaganda ?
6. Ĉu en la kadro de sekcio aŭ propri-niciato ?

**LA DANA ESPERANTO FILMO.**

Jam unu jaro la turista filmo pri Danlando, kun Esperanto-tekstoj, travojaĝas nian landon, kaj la eblaj por montri ĝin en diversaj medioj ne ankoraŭ elĉerpigis. Dum la pasinta vintro nia samideano Van Eynde el Wilrijk, kiu disponis pri projektilo, nelacigeble aranĝis vesperojn ĉe esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Dum la somero la ritmo malvigligis, kvankam intertempe la posedanto ŝanĝigis. Estis sekcio Brugge, post Gent kiu per la filmo somere organizis du kunvenojn, foje por junaj laboristoj kaj foje por la sekcio Assebroek de Davidsfonds).

La vintro apenaŭ anoncis sin, kaj ja ne plu pasas semajno, en kiu ie en la ĉirkaŭaĵo de Brugge la ĉarmaj bildoj de Danlando ne ĝojigos kaj interesigos multajn ne-esperantistojn.

Multon ni ŝuldas al nia vicprezidanto Roose, kiu kiu interese paroladas preskaŭ unu horon antaŭ la filmprezentado, kaj lerte intermiksas propagandon por nia lingvo.

Jen sekvas kelkaj rezultatoj :

1. RUMBEKE : 8.10.50. Prezentado en lernejo. Tre interesa publiko : ĝinstruistoj. Pastroj k.p.t. Entute 80 ĝeĉeestantoj.
  2. ROESLAERE : 23.10.50 En la festalono de la urbdomo — 350 ĝeĉeestantoj, kiuj entuziasmiĝis. Multaj studentoj kaj intelektuloj i.a. la kolegiestro.
  3. IZEGEM : 3.11.50. En la salonego de la episkopa kolegio. Iom pli ol 150 personoj, i.a. studentoj, kelkaj profesoroj k.t.p. La malbona vetero malpliigis la sukceson.
  4. TORHOUT : 9.11.50. Iom pli ol 130 personoj. Kelkaj intelektuloj, multaj laboristoj kaj kamparanoj.
- La filmo konsistas el du partoj : en la unua temas precipe pri la geografio kaj la historio, en la dua pri la industrio, la ekonomia situacio, la socia vivo. Kutime ni montras unue la duan parton kiu estas la malpli sukcesa, kaj ne enhavas tiom da belaj bildoj kiom la unua. Se iu reprezentanto aŭ sekcio havus la okazon organizi tian vesperon, eble en kunlaboro kun sekcioj de la V.T.B., skoltaj, aŭ aliaj, oni nepre tuj avertu la sekretariejon.

**BIBLIOGRAFIO**

eble plej, la neoficialecon (?) de la prefikso eks, kies uzon s-ro Randi malkonsilas, dekstri anstataŭ dek tri, k.t.p. Strange impresas kvin fojoj kvar = 20 kaj la jena regulo : « Iedere keer, dat in een zin een bepaling optreedt zonder voorzetsel, staan de kleine woordjes, eindigend op e, ie, enz. in de vierde naamval, d.w.z. dat na deze woorden de letten n toegevoegd wordt ». Sur pago 46-a ne temas pri superlativo absoluta sed pri rilata superlativo. Kritikindaj estas ekz. jenaj frazoj : « la plej granda felicy post tiu de ne naskigi... », « en necesaj (ĉu necesigaj ?) cirkonstancoj unueco », « peltu estas haŭto, kiu ŝanĝiĝas je besto », « la plej granda parto de la aferoj havante du flankojn estas juĝataj bonaj aŭ malbonaj laŭ ke ili estas konsiderataj », « tiu libro ne agrable legiĝas, kvankam mi ŝatas legi kaj ke mi kapablas rapide legi ». Ni trovis plurajn ĝenajn preseraĵojn. « Examen doen » kaj « 100 vragen » ne estas eldonaĵoj de F.L.E. sed de F.L.E. kaj L.E.E.N. kune. Malgraŭ tiuj kritikindaĵoj la libro havas multajn bonajn ecojn kaj certe pluraj kursgvidantoj sukcese kaj volonte uzos ĝin en siaj kursoj. La libro estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto, postbus 342, Brussel.



## Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION akiris por VEB, post n-roj 93-94 : s-ro Iserentant, el Brugge, (90 p.), kaj por LEEN : A. Lodema el Amsterdam.

### SOLVOJ

N-ro 95. *Horiz.* 1. stopi. 2. sin. 3. maŝinapilo. 5. limonad. 6. donac. 7. fusil ; figur. 8. akt. 9. rigl ; kupe. 11. revolvero.


*Vert.* 1. pafark. 2. traf. 3. sag. 4. pri-ridi ; lav. 5. mola. 6. spron ; kugl. 7. via ; naft. 8. inflaci ; kle. 9. glu. 10. kalk. 11. torped.

N-ro 96. *Atentu* : du vortoj mankis en la difinoj de n-ro 96, bedaŭrinde. Bonvolu legi : *Vertikale*. 8. distingilo pri vero kaj malvero (R) ; verŝi (R). 11. NE malfermi sian buŝon (R).

Solvoj akceptataj ĝis 20.12.50.

### N-ro 97 : KRUCVORTENIGMO.

*Horizontale.* 1. Li organizas kaj faras kurson (R). 3. meritanta malaprobon ; 5. ne cedi al (R) ; tuŝis per la lipoj. 7. subite percepti per la okulo (R) ; restaĵo post detruigo. 9. troigi. 11. ni bezonas ĝin por korespondi. — *Vertikale.* 1. li posedas sufiĉajn konojn por bone plenumi sian taskon (R). 8. neabsoluta (R) ;



malmola korp parto (R). 5. semo (R) ; haŭtmalsano (R). 7. montri (R) ; tia butero havas malagraban guston. 9. rekoni ; pensajo (R). 11. ekokupo de alia loĝejo.

N-ro 98 : KUNMETU el la subaj litergrupoj 31 naŭliterajn vortojn, tiel ke ili adaptiĝas al la jam donitaj literoj en jenaj vortsketoj : 1. xLxxYxIxx ; 2. PxxSxYxBx ; 3. xKxxDxYxO ; 4. xxVxxTxYx ; 5. xAxxFxxYxO ; 6. BxxExYxNx ; 7. xxSxYxLxx ; 8. xAxYxLxxO ; 9. TxYxKxxLx ; 10. xYxAxxRxx ; 11. YxNxxExxI ; 12. xYxTxExx ; 13. FxYxVxxTx ; 14. xNxxYxZxxA ; 15. xxRxxYxxExx ; 16. ExxPxxYxxIx ; 17. xAxxKxxYxO ; 18. xxAxxFxxYx ; 19. xRxxLxxYxxA ; 20. KxxKxxYxxMx ; 21. xxCxxYxxNxx ; 22. xExYxAxxO ; 23. MxxYxxAxxLx ; 24. xYxIxxNxx ; 25. YxExxAxxO ; 26. xYxNxxAxx ; 27. KxxYxxNxxRxx ; 28. xOxxYxxNxxA ; 29. xxBxxYxxCxx ; 30. MxxMxxYxxDxx ; 31. xTxxNxxYxI.

Oni anstataŭigu do la signojn x kaj Y. La literoj anstataŭantaj la signojn Y formas proverbon, se oni legos ilin laŭ la ĉi-supre donita ordo. La litergrupoj estas : ace ; ado ; afr ; ako ; akt ; alo ; ang ; ano ; aro ; aro ; ato ; azo ; but ; cen ; cio ; cio ; dol ; eks ; ela ; ele ; end ; ent ; ero ; erp ; eto ; fre ; iav ; ibi ; ide ; iki ; iki ; ila ; inc ; ink ; ino ; inv ; ion ; iri ; iva ; izi ; kal ; kal ; kan ; kar ; kar ; kla ; klo ; kon ; kon ; kta ; ktr ; kve ; lab ; luz ; mak ; man ; mar ; mar ; mel ; mis ; nav ; nkx ; nti ; nto ; nto ; oli ; ono ; ora ; pan ; par ; pre ; pro ; rdi ; rep ; rio ; rni ; san ; sif ; sio ; skr ; spe ; ste ; str ; sub ; tif ; til ; tra ; tra ; umo ; uta ; ven ; viz.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z. ; kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brusel, antaŭ la 20.12.50.

S-ro Sigeru Morita, 18-jara studento, Sindon 428, Riuou, Nakakoma, Yamana si, Japanujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun nederlandaj samideanoj.

Illustrita reklamilo, dukolore presita pri 22 diversaj Esperanto-stampiloj kiujn oni povos uzi por leterpaperoj, kovertoj, cirkuleroj, k.t.p., senpage havebla ĉe A. Grevilliot, gravuristo, 4 rue Mercière, Mulhouse (Fr.).

## Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — *Afdeling Antwerpen* : Op 16-12 richt het Comité der Antwerpse Esperantisten (EKI) een voordrachtavond in over het huiselijk leven in Japan. Mej. Tusveld zal die lezing houden en Japanse liederen voorzingen. Iedereen is harte-lijk uitgenodigd, ook de niet-Esperantisten. De avond gaat door in het café « De Witte Leeuw » — schuin over de Vlaamse Opera — te 20 uur. Om die reden wordt ons winterfeest uitgesteld tot 20-1-1951.

V.E.B. — *Afdeling Brussel* : Ons grammatika December is als volgt : 7-12 : Viering St. Nikolaasfeest ; 14-12 : vertaling met grammatikale uitleg (Sep vangofrapoj) en de oefeningen uit F.E. ; 21-12 : gesproken dagblad.

V.E.B. — *Afdeling Gent* : Dank zij de goed doorgevoerde propaganda van Dhr Mortelmans, is de cursus in het Koninklijk Atheneum te Deinze uitgegroeid tot een waar succes. Acht en veertig leerlingen van de Middelbare Afdeling schreven in voor de cursus. — Gedurende de maand Oktober kondigden de dagbladen regelmatig de cursus aan welke door Mr De Boes zal gegeven worden in V.T.B. GENT, van 15 November of. — Mr Besbrugge vertoende voor onze leden een reeks lichtbeelden, waaronder verscheidene kleurenfoto's over het Kongres te Parijs, over Nederland, Zwitserland en Italië. — De laatste Woensdag van Oktober hield Mr Vanneste een voordracht over de verwerking van chocolade en illustreerde zijn spreekbeurt met behulp van praktische oefeningen en proefnummers.

V.E.B. — *Afdeling Kortrijk* : Op 16-11-50 vond een bijeenkomst plaats van enkele ongeorganiseerde Esperantisten ; er werd besloten een E-club op te richten, die wekelijks op Donderdag een les-bijeenkomst houden zal in het « Middenstandshuis » Langesteest. 10 van 19,30 tot 21 uur. Als lesgevers treden afwisselend enkele veteranen op vanaf 23-11-50. Belangstellenden zijn welkom. Briefwisseling : J. Merks, Beheerstraat 8 (tel. : G. Debrouwerke : 216.54).

## ANONCETOJ

Ciu vorto aŭ mallongigo : g. 0,05 aŭ bfr. 0,75. Minimume : g. 1. — aŭ bfr. 15. —

Miloslav Sinkora — 19-jara gimnazia studento, deziras interŝanĝi afrankajn p.k. Adreso : Pribenická 738. Tábor — Ĉeĥoslovakujo.

Japanoj, deziras korespondi :

22-jara inĝeniera studento, Kazuja Tojoda, Jenriuso 5, Akasa-mura, Hamanagyn, Sizuokaken.

15-jara lernantino de mezgranda lernejo, Kōko Ozaura, Le Kumi, Okinohasi, Gifa-si.

16-jara gimnaziano-Syoichi Ishimura, 241, Misima, Wasima-mura, Agataumagun Gumma-ken.

16-jara gimnaziano, Keiji Isonaga Tano-cho, Miyazaki-gun, Miyazaki-ken (pri kutimoj sportoj en Japanujo).

22-jara studento, Kusumi Simizu, 40, Hannan-tyo Higasi I, Abeno-ku, Osaka. (pri popolkutimoj).

19-jara jura studento Jadamu Yamamoto -ĉe S-ino Jomi Aoki, 2-204, Hata-gaya-honmachi, Shibuya-ku, Tokio. (pri literaturo kaj muziko).

19-jara studento (ekonomio) Toshio Fukaya, 18, Omachinagoya, Wakamatsu (Aizu) Fukushima-ken. (pri il.p.k., p.m., muziko, kaj tiel plu).

### EEN VLAAMSE ABDIEN-KALENDER

Als waardige voortzetting, na de reeks « Vlaamse stadhuizen », waaraan de Vlaamse Toeristenbond en de Vlaamse Automobilistenbond voor 1950 hun kalender wijdde, verschijnt thans een prachtserie van 13 zeer geslaagde grote foto's, gewijd aan abdijen uit de vijf Vlaamse provincies, monumenten van Vlaamse stijl en beschaving.

De kalender, die nog keuriger verzorgd is dan de vorige, op beter papier en met fraaier foto's, kost slechts 15 fr. en is verkrijgbaar in de V.T.B.-boekhandels te Antwerpen, Brugge, Brussel en Gent, of door storting van 15 plus 1 fr. op de postrekening nr 936.27 van de V.T.B., St. Jakobsmarkt 45, Antwerpen.

## La insulo « Sankta Borondono »

### Mirgeografia rakonto

De J. Régulo Pérez (Kanariaj Insuloj)

arĥipelago, antaŭ ol organizi novan ekspedicion, ordonis al aŭtoritatoj de *La Palma*, *La Gomera* kaj *El Hierro* fari plej severan kaj ekzaktan enketon. Kaj jen la estro de la insulo *El Hierro*, *Alonso de Espinosa*, famigis sian nomon sendante informadon kun deklaroj de pli ol cent okulaj atestantoj pri la ekzisto de *Sankta Borondono* ; iuj eĉ deklaris, ke ili vidis la sunon sinki trans tiun insulon.

Sed plejan atenton vekis informo el *La Palma*, liverita de tri atestantoj, kiuj deklaris, ke ili elŝipigis ĉe la strandoj de *Sankta Borondono* kaj eĉ iom esploris ĝin. Tiuj atestantoj estis tri portugaloj el *Setúbal* ; unu el ili estis *Pedro Velho*, piloto kaj spertulo pri navigado al Brazilio. *Velho* diris, ke li elŝipigis kun siaj ŝipanoj, trinkis freŝan akvon ĉe torento, vidis sur sablo paŝosignojn pli grandajn ol ordinare ; li aldonis, ke ĉe arbotrunko li trovis krucon alnajlitan per fernajlo ; ke ne malproksime estis tri ŝtonoj aranĝitaj kiel subteniloj por kuliri manĝaĵon, kun postsignoj de fajro. Krome li diris ke li vidis kaprajn kaj ŝafajn arojn, ktp. Poste venis la nokto, ekblovis ventego kaj li kaj liaj ŝipanoj, krom du malfruintoj, devis rapide ensipiĝi, precize je tempo, kiam jam ekfuriozis ŝtormo. Post la ŝtormo, kvankam ili denove serĉis la insulon, ili ne povis ĝin trovi, kion li tre bedaŭris, ĉefe pro la du kamaradoj tie restintaj.

*Pedro Ortiz de Fúnez*, kanoniko kaj inkviziciisto de Kanarioj, trovis alian vizitinton de la insulo, nome *Marcos Verde*, kiu elŝipigis kun kelkaj kunuloj kaj trakuris la insulon, ĝis la nokto falis. Tiam pro timo ili ree ensipiĝis, guste kiam komencis granda ŝtormo, kiu devigis ilin rapide tranci la velajn ŝnuregojn por eviti tujan ŝippeeron.

Le kronikisto de Kanarioj *Abreu Galindo* postlasis al ni rakonton de franca aventuristo, kiu, post ŝtormo, alvenis kun la mastoj frakasitaj nekonatan teron, plenan de fortikaj arboj. Post hako de tiuj kiujn li trovis plej taŭgaj kaj prilaboro por anstataŭo de la frakasitaj mastoj, li kaj liaj amikoj revenis al la ŝipo, ĉe noktigo, kaj sekvan matenon ili atingis feliĉe la insulon *La Palma*.

Ne estis dubo. Ekzistis la oka insulo de la *Kanaria Arĥipelago*. Tiel *Fernando de Villalobos*, estro de *La Palma*, aranĝis novan ekspedicion, kiu, post sia fiasko, ne havis almenaŭ la feliĉon maltrompigi aŭ disrevigi la insulanojn. Ĉar, 34 jarojn poste, la sama insulo *La Palma*

helpis ekipi novan ŝipon por bonigi la malsukcesojn de ĝiaj antaŭuloj. Ĉi tiu ekspedicio estis komisiita al la du plej spertaj maristoj de la insularo : *Gaspar Pérez de Acosta* kaj pastro *Lorenzo Pinedo* kiu ornamis sian franciskanaran talaron per granda sperto pri marferoj. Sed malgraŭ tre severa kaj plej detala serĉado, la ekspedicianoj ne povis doni al si la ĝojon trovi eĉ plej etan signon, kiu indikis proksiman teron.

Ankoraŭ la ĉefkomandanto de la insularo generalo *Don Juan de Mur y Aguerre*, en 1721, komisiis al la marsperta kapitano *Gaspar Domínguez* novan esplorado. De *Santa Cruz de Tenerife* eliris la ekspedicio. Sed, ho ve ! fojon plian la insulo ne estis trovata. Ŝajne la fato signis, ke la trovo de la insulo restos ĉiam nur ĉe la senfrukta ĝloro de la intenco !

Jes ja ! Tluj ne estis la solaj ekspedicioj, nur la plej gravaj kun oficiala instigo kaj helpo. Ĉar al kiuj kredis la ekziston de *Sankta Borondono*, al tiuj sufiĉe kompensis la malmultan aŭtoritaton de siaj asertoj la belaj imagaĵoj, kiujn la fantazio donis al ili. Tial, ke paroli pri sorĉistoj, malicaĵaj efikoj, elfo, kaj feo-mondoj, ensorĉaĵoj, nigramagiaĵoj kaj aliaj mirindaĵoj — kaj paroli plej serioze —, tiu estas plezuro kaj pasio, kiuj ĉiam allogis grandan plimulton de la homoj. Sekve la sorĉkaŝita insulo *Sankta Borondono* valoris mil fojojn pli — kaj ĝi ankoraŭ valoras ! — ol dek malkovritaj realaj Sanktaj Borondonoj.

Ĉar, nu kiaj teatroj, kiaj scenoj, kiaj personoj rolas en tiu sorĉa lando ! Mi legis latinlingvan priskribon de *Pedro de Medina*, kiu diras, ke tiu insulo havas ĉefepiskopon kun ses episkopoj kaj sep riĉegajn urbojn, pro kiuj kelkaj nomas ĝin « la insulo de la sep urboj » ; ke ĝi posedas havenojn kaj grandajn riverojn, kaj ke ĝin loĝas kristana popolo, riĉa kaj superŝutata de ĉiaj bonoj. — Aliaj priskribas ĝin, ekzemple ĉe *Philoponio*, dirante, ke ĝi estas insulo ŝirmita per oraj muregoj, travideblaj kiel kristalo, sed sen enirejo...

Kaj kiel venis la nomo *Sankta Borondono* al tiu ensorĉita insulo ? Ĉi tiun nomon (ankaŭ sub la formo *Brandano* aŭ *Blandano*) ŝajne la mirinsulo ŝuldas al la skota monaĥo *Sankta Brandano*, *Brandano* aŭ *Blandano*, kiu predikis en Skotlando dum la dua duono de la VIa jarcento. *Sankta Maklovio* (alinome *St. Malo*) sciis, laŭ *Sigeberto de Gembloux*, ke ek-

zistas iuj insuloj treege ĉarmaj kaj agrablaj, loĝataj de idolanoj. Tial, dezirante konverti ĉi tiujn, li decidis ekvojaĝi kun sia Mastro *Sankta Brandano*. Post iom da navigado alvenis Parko kaj dume ili ne vidis teron, kaj, ĉar tiu festo ekscitis tre vive iliajn animojn al la deziro festi la sanktajn misterojn, ili senĉese preĝante petadis al Dio la favoron veni apud teron por plenumi sian deziron. Dio aŭdis iliajn petojn, kaj jen subite meze de la maro levigis insulo, kie ili tuj elŝipiĝis. Tie ili konstruis altaron, kaj, post meso kaj distribuo de la eŭkaristia pano, ili ree ensipiĝis kaj ekvelis. Sed kiom ili miris, kiam ili tuj konstatis, ke, kion ili kredis tero, tio estis nur monstra baleno, kiu tuj malaperis !

Tial, ĉar *Sankta Borondono* elŝipiĝis sur insulo, kiu aperis kaj malaperis tute subite ; ĉar oni kredis, ke *Kanarioj* estis la teatro de tiu sceno, kaj ĉar oni parolis pri malkonstanta insulo ie transe de *La Palma* kaj *El Hierro*, estis tute ordinaro, ke oni alnomis tiun teron insulo de *Sankta Blandano* aŭ *Sankta Borondono*.

Nu, kio restas hodiaŭ el tiu bela mirgeografia mito, kiu havis kiel scenejon *Kanariojn* ? Sur la okcidenta parto de la insulo *La Palma* nun troviĝas vilaĝo, apud la haveno *Tazacorte*, kun nomo *San Borondón*, ĉar tiu loko estis bona videjo al la sorĉinsulo. Inter la kamparanoj de la okcidentaj *Kanarioj* ĝis hodiaŭ kuras famoj pri tiu mistera insulo, videbla nur ĉe hele klaraj mateniĝoj, antaŭ sunleviĝo, de la somermeza nokto aŭ tago de *Sankta Johano* ; laŭ tiuj famoj, iuj foje vidis tie domojn, homojn, vestojn pendigitajn por sekiĝo, kamparanojn kiuj falĉas kaj rikoltas cerealojn, pelas brutarojn, paŝtas, ktp. Tamen plej kurioza el ĉiuj spuroj de la okultema insulo estas dokumento, kiu ĝis antaŭ ne longe troviĝis en la arĥivo de la ĉefkomando de *Kanarioj*, per kiu oni asignis militestron al *Sankta Borondono* kun konvena salajro por komando de la insulo. Jen fakte ekzistis komandantoj *in partibus imaginantium* !

Hodiaŭ *Sankta Borondono* estas bela mito el la pasinto de la *Kanaria Arĥipelago*, foje literature traktita de regionaj verkistoj. Iuj el ili eĉ volis vidi en ĝi ligilon de *Kanarioj* al la *Alta Nordo*. Kiel literatura ponto ĝi estas belega, kaj krome ĉarma substancujo, kiu parfumas, per legenda aromo, la spiritan atmosferon de *Kanarioj*.

Verantw. uitgever : Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brusel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij : J. Van Laer, Korte Begijnestraat 38, Turnhout.

Se en la geografia scienco foje estiĝis malfacila problemo aŭ grava paradokso, probable neniu superis tiun pri la insulo *Sankta Borondono*, laŭdire situanta ne malproksime de la tri plej okcidentaj insuloj de la *Kanaria Arĥipelago*. Ĉar, jes ja, por agnoski ĝian ekziston, necesis tro riskeme forlasi sanan kritikon, juĝadon kaj racion ; kaj, por ĝin nei, necesis flankenmeti tradicion kaj sperton, pruvante al multaj kredinduloj, ke ili neniam sciis bonuzi siajn sentumojn.

Ŝajne la famo estiĝis post la konkerfino, 1496, pro legado de la geografia de *Ptolomeo*, kiu inter la *Feliĉaj* (aŭ *Fortunataj*) *Insuloj* metis unun kun nomo *Aprósitos*, greka vorto, kiu signifas « nealireblan ». Sekve, en la jaro 1519, ĉe la paco de *Evora*, kiam *Portugaloj* cedis al *Hispanoj* siajn rajtojn super *Kanarioj*, inter ĉi ties insuloj, estis menciata unu, laŭnome (portugale) *Non Trubada* aŭ (hispane) *Encubierta* (= ankoraŭ ne malkovrita).

De tiu tempo nei al la logantoj de *La Palma*, *La Gomera* kaj *El Hierro* (la tri plej okcidentaj insuloj de *Kanarioj*), ke tio kion ili kutimis vidi, kelkajn fojojn jare, jen sudokcidente de *La Palma*, jen nordokcidente de *El Hierro*, ne estis tero sed imagaĵo, tio ja estis nur ilin intence mokĝeni per neo de evidentajo, ĉar ili ĉiuj ja ĉiam sciis distingii inter nubaro kaj firmtero. Cetero multaj desegnis ĝian perspektivon ĉe unu apero kaj, ĉe rea vido, ili plej kongrue trovis ĝin je sama distanco, kun sama konturo, ĉe sama loko, identa je profilo. — Mi mem legis dokumenton de franciskana religio, de la jaro 1759, kun aldonita desegno, kaj li havas la sinceran stilon de kiu diras ne pli ol li kredas Ĝi estas rakonto de okula atestanto.

Dum la jarcentoj XVI, XVII, XVIII, *Sankta Borondono* estis la granda himero de la kanarianoj, kaj ĝi estis konsiderata tiel serioze, ke multaj prudentuloj sin kredis en la devo honorinde oferi sian havaĵon kaj sian ripozon por malkovri, kiu intereso la patrujon kaj havigos al ili kaj famon kaj riĉon. La unua konata ekspedicio estis tiu de *Fernando de Troya* kaj *Fernando Alvarez*, kiu eliris de *Gran Canaria* la jaron 1526. Vere ĉi tiu ekspedicio devus esti estinta la plej frukta, ĉar, ne trovinte eĉ plej etan ombron de tiu insulo, ĝi portis al la arĥipelago la gloron de disrevo, kiun la insulanoj dankus, se la fantomo de la ŝajna tero ne estus havinta en si la sekreton ensorĉi ĉiujn, kiuj ĝin vidis.

Tiom da sofismaĵoj *Sankta Borondono* faris, tiom ĝi sciis mistifiki rigardantojn, ke oni oni kredis pli prudenta dubi la konduton de la esploroj, ol fidelon al propraj sensoj. Tial en 1570 D-ro *Hernán Pérez de Grado*, supera ĉefo de la